ESPERANTO INTERNACIA LINGVO

# ELNA-BULTENO

## ESPERANTO-LIGO POR NORDA AMERIKO

Numero 7(71) Marto 1971

MON-DONACOJ RICEVITAJ POR UK-KONGRESO EN PORTLAND, 1972

ELNA-kasistino, Peggy Linker, raportis, ke la UK-Fonduso ricevis ĉekon anonime je la valoro de $60.00. Nomoj de donintoj troviĝas finpaĝe.

LA 19-a ELNA-KONGRESO EN SAN ANTONIO, TEXAS, OKAZONTA

Peggy Schneider, prezidantino de la Esperanto-Klubo Von Nimitz, logis ĉiujn al la kongreso, en la Hotelo Gunter, per jena prezento: "La epoko de la akvoportanto estas la epoko de mem-plenumiĝo. Kiel vi plenumiĝas? Ĉu spektante la urbscenon de la supro de la Turo de l'Amerikoj, ĉu kavesplorante kie la sole konata 'fritita ovo-formacio' ekzistas, ĉu riverkrozante kaj manĝante meksikiajn frandaĵojn, promenante tra serio de famaj belaj misioj, ĉu vizitante unu el la tri plej grandaj bestĝardenoj en Usono, aŭ butikumante en bonegaj klimatizitaj korsoj - tiel, kiel vi vin plenumas, tiel vi povas kontentiĝi en la urbo San Antonio."

LA SESA ESPERANTO-PACIFIKA KONFERENCO

Aprilo, la 2an ĝis la 4a, estas la tagoj elektitaj por la konferenco, kiu temas pri "Filiteraturo en Esperanto," ĉe la Padre Trail Inn, 4200 Taylor St., San Diego, Cal. La planoj inkluzivas ne nur diskutojn pri romanoj kaj poemoj, sed viziton al la domo de gesinjoroj Helmuth, kaj piedan ekskurson tra la loka malnova urb-kvartalo.

LA 75-a MONATA KUNVENO DE SFERO

Sabaton, la 6an de marto, 1971, ĉe la civita centro-biblioteko, en San Francisco, Cal., havis la regiona organizo (SFERO) sian 75an monatan kunvenon, kun libro-montraĵo, tielnomita lingvo-forumo, kaj programo.

ESPERANTO EN LA LERNEJOJ DE HAWAII

S-ro Don Sanborn, de la "Hawaii Curriculum Center," Honolulu, diris en intervjuo kun S-ro Rokuro Tokuda, internacia novaĵ-radio-komentisto de Japanujo, ke, ek de septembro, 1971, ĉiuj (200) lernejoj en Hawaii komencos la instruadon de Esperanto.

KVAR USONANOJ EN INTERNACIA GAZETO

En la februara numero (783-2-1971) de "Esperanto," oficiala organo de UEA, Rotterdam, Nederlando, aperis la vizaĝoj de kvar konataj esperantistoj usonaj. Sur la kovrilo estas la 3-jara knabeto, Danny Boschen, kies patro, Allan Boschen, estas menciata kiel "unu el la plej aktivaj Esperanto-instruistoj en Usono,"kaj dekstre staras John L. Lewine, menciata kiel "konata figuro en la usona Esperanto-movado." Oni fotis ilin en klasĉambro en Pittsfield, Mass., dum la knabeto staras sur tablo kaj indikas per montrilo la alfabet-literojn. Sur la paĝo 32 aperis foto de S-ino R.L.Wills, kun la 11-jara studanto, Jack Babbert, dum ili sonbendigas lecionojn por la radiokurso de la ŝtata Universitato de Ohio (WOSU), kaj por la stacio de la urba lerneja konsilantaro de Columbus, Ohio (WCBE).

PAROLADO PRI ESPERANTO HAVIS REZULTON

Dum sia vizito al Walla Walla, Wash., en januaro, 1971, S-ro Rakuro Takuda, komentisto el Japanujo, parolis al grupo de edukistoj, kaj priparolis Esperanton. Pro tiu parolado publiklernejestro starigis klason, kiun okgradaj lernantoj povas elekti, anstataŭ pentrarto aŭ ĥoro. Ĉi tiun Esperantostudklason elektis 16 studentoj, kaj eĉ lernejinstruisto!

# ELNA-BULTENO

**KUNFONDINTOJ** Donald Munro, Rodney Ring

**ADRESO** ELNA-Bulteno, Muhlenberg College, Allentown, Pa. 18104

PIONIRA ESPERANTISTO MORTIS

S-ro Donald Stephens, 2313 Woodland Lane, Arden, Del., Mortis en januaro je la aĝo de 84. Li estis inter la unuaj Esperantistoj en Usono, kaj estis fidela al la movado dum sia tuta vivo. Kvankam ni ne certe scias kiam li unue lernis la lingvon, D-ro Raymond Bye, 506 Glenwood Ave., Moylan, Pa., kiu lernis ĝin en 1907, konstatas, ke Donald Stephens fariĝis Esperantisto antaŭ 1925, verŝajne longe antaŭ tiam. Li amis pacon, kaj ofte suferis pro siaj ideoj, ekzemple, kiam en 1911 li kaj Upton Sinclair enmalliberejiĝis kaŭze de tielnomitaj "bluaj leĝoj," aŭ en 1918, kiam li rifuzis fariĝi soldato. S-ino Eleanor Roosevelt vizitis lin en Arden, Del., en 1935, kaj pluraj famaj mondkonataj personoj korespondis kun li tra la jaroj. Ankoraŭ vivas la vidvino, du filinoj, kaj ok nepoj.

SEMAJNO DE AMIKECO EN WALLA WALLA KAJ NOVJORKO

La 27an de februaro, 1971, la Esperanto-Societo de Walla Walla, Wash., finfestis la okazon de la Semajno de Internacia Amikeco per vera internacia manĝo, ĉe kiu estis invititaj fremdlandaj gestudentoj el loka kolegio.

Samtempe la Novjorka Esperanto-Societo havis kunvenon kun studentoj de Bryant Adult Center, kie Mark Starr ankoraŭ gvidas du studgrupojn.

SKOLTOJ EN PORTLAND KAJ EN NOVJORKO EKLERNIS PRI ESPERANTO

Hazel Heusser, kiu uzas sian ferion en varbado kaj instruado, raportis, ke 15 skoltoj kaj parencoj, irontaj al la internacia kunveno (Jamboree) en Japanujo, studas Esperanton ĉiun lundon vespere, en Lincoln High School, en Portland, Ore.

Ankaŭ, individuaj skoltoj kaj siaj estroj, kunven-partoprenantoj, ĉe novjorka kunveno, aŭdis du paroladojn pri Esperanto, unu de John Kailenta, kaj unu de Mark Starr. (Por skoltinformoj skribu al Informcentro Okcidenta.)

VIGLA ESPERANTO-KLUBO EN CENTRA OHIO

En Columbus, Ohio, kunvenas ĉiumonate la Esperanto-Klubo de Centra Ohio, kutime ĉe la YWCA, 65 South 4th St. Dum la januara kunveno, la 17an, 1971, ili elektis novan estraron: Prez., D. R. Morey, 254 Thurman Ave., Columbus, Ohio 43206; Vic-Prez., R. Swisher, 1510 Cardiff Rd., Columbus, Ohio 43221; Sek.-Kas., D.L. Kasler, 1641 East Columbus St., Columbus, Ohio 43206.

SCIO PRI INTERNACIA LINGVO PLIGRANDIĜIS EN NORDOKCIDENT-USONO

S-ro J.E. Work, 49 Ann Marie Dr., Bellingham, Mass. 02019, kiu ŝatas la korespond-sistemon "Verda Stelo," kaj invitas ELNA-anojn partopreni, donis prelegon, "Esperanto and the Multiplicity of National and Technical Languages," dimanĉon, la 7an de februaro, 1971, ĉe la loka "Nordeca Societo."

ESPERANTA LITERUMA ALFABETO UNIVERSALA POR RADIO-AMATOROJ

Bunnie J. Chambers, 1740 Nakula St., Wahiawa, Hawaii 96786, sperta radio-amatoro, raportis, ke sia radio-rondo esperantista (vid."Esperanto," okt.,1970, p. 146) laboris kun provado de la literuma alfabeto de UEA (vid. "Jarlibro," 1970, p. 497), kaj malkovris, ke pli ol duono de tiu ĉi alfabeto ne estas sufiĉe komprenebla al neesperantistoj, ke ili, tamen, kun nova formo, fine sukcesis! Ili laboregis pri la traduko de la nova formo en diversajn nacilingvajn literumojn. Ni intencas uzi spacon en la venonta ELNA-Bulteno, por inkluzivi la plenan raporton en Esperanto. Ni esperas, ke la usona radio-amatora ĵurnalo, QST, publikigos la nacilingvan artikolon sendita al ili.

PLANO POR DISVASTIGADO DE ESPERANTAJ GAZETOJ

Se vi deziras legi gazetojn esperantajn, sendu vian adreson al la nova "Round Robin"-listo. Jen la plano: La ELNA-Sekretario sendos ĉiun gazeton al la unua adreso sur la listo, kiu persono plusendos ĝin al la dua adreso, ktp. Ĉiu ano de la ĉeno ricevos ekzempleron de la listo, kaj la sola kosto estos por la afranko kiam vi enpoŝtigos la gazeto(j)n al la adreso post la via. La lasta persono sur la listo sendos la gazeto(j)n al nia arkivo en Kalifornio. Skribu al: Round Robin, Conrad Fisher, Route 1, Meadville, Pa. 16335.

LISTO DE KAMPADISTOJ TRA LA MONDO

Se vi ŝatas kampadon, kaj deziras enlistiĝi inter esperantistaj kampadistoj, bonvolu komuniki kun la "Interrilata Centro Internacia de la Esperantistaj Kampadistoj," 12 Avenue Alsace Lorraine, 28 Chartres (Eure et Loir), Francujo. Ili serĉas nomojn kaj adresojn el ĉirkaŭ la mondo.

## NI KORESPONDU

23-jara komencantino, studentino pri kemio, deziras korespondi precipe kun fraŭloj el Usono, Kanado, Suda Ameriko, kaj Japanujo. Ŝia edzo, poeto esperantista, Daniel Kolker, garantias respondon. Ljuba Kolker, S-Kolcevaja 20-149, Zaporoĵe (Zaporozhe) 58, Ukrajno (Ukraine), USSR.

31-jara skriboficisto volas interŝanĝi leterojn kaj poŝtkartojn. S-ro Joaquim de Souza Filho, Rua Magahales Conto, 483/205, Rio de Janeiro-Guanabara Zc16, Brazilo (Brazil).

Mez-usona jun-esperantisto kaj sia klubo deziras interŝanĝi sonbendojn kun aliaj esperantistoj el ĉirkaŭ la mondo. Lewis Cook, Jr., Box 422, Circleville, Ohio 43113 (U.S.A.)

22-jara ekonomistino kiu interesiĝas pri antikvaĵoj, vojaĝoj, muziko, ktp., serĉas geamikojn en Usono. Trena Sanicka, Ul. Jerzego 3, Zabaze, Pollando.

Fizikstudanto kaj bildkartamanto 23-jara, kiu ĉie kaj el ĉie kolektas vojaĝprospektojn, senpagajn broŝuretojn, ktp., deziras korespondantojn. S-ro Siegfried Moebus, Markt 8, Delitzsch 727/bei Leipzig, DDR(GDR), Germanio.

20-jara flegistino volas korespondi kun junaj (18-30 jaraj) amikoj. Ŝi amas popularan kaj simfonian muzikon, kaj kolektas kolorajn kartojn pri urboj kaj floroj, ktp. F-ino Krista Fajkusova, Lugerovice 530, Okr. Opava, Czechoslovakia.

16-jara nova esperantisto, kies patro estis sperta bulgara skulptisto, volas korespondi kun usonanoj. Georgi Luĉianov, Str. Slavjanska 12, Sofia, Bulgario.

Nova Mez-usona esperantistino, kiu eklernis la lingvon, serĉas kontaktojn kun amikoj de Esperanto en Minesoto kaj Mizurio. S-ino Blanche M. Lage, 1514 4th Ave. North, Fort Dodge, Iowa 50501.

40-jara bankoficisto deziras korespondi per leteroj kaj ilustritaj kartoj. S-ro Hector G. Espinosa, C.C.22, Suc.8, Buenos Aires, Argentinio (Argentina).

Juna vigla brazila gelernintaro (eks-anoj de komencklaso en Natal, kiu ĵus finigis la studon) havas diversajn interesojn, sed ĉiuj deziregas korespondantojn. Ses: 16-jara fraŭlo, Edilson Dias de Araujo, Rua Barborema, 1103, Alecrim-Natal R.N., Brazilo; 12-jara fraŭlineto, Maria Loretti Pereira Felipe, Rua Belo Monte 561, Rocas-Natal R.N., Brazilo; 17-jara fraŭlo, Francisco das Chagas Olveira da Silva, Rua Sousa Pinto 1088, Lagoa Seca-Natal R.N., Brazilo; 16-jara fraŭlino, Maria de Fatima Alves, Rua Expedicionario Jose Varela 42, Rocas-Natal R.N., Brazilo; 20-jara fraŭlo, Marcos Aurelio Barbosa, Rua Vigario Bartolemeu 570, Cidade Alta-Natal R.N., Brazilo; 14-jara fraŭlo, Luis Antonio Pereira Felipe, Rua Belo Monte 561, Rocas-Natal R.N., Brazilo.

# ARTIKOLOJ

## SANTA BARBARA, CALIFORNIA
de C. W. Chapman

Santa Barbara, California, estas urbo kiu, laŭ legendo, naskiĝis per "edziĝo" inter grandega montaro kaj blu-verda maro. La beno de la kristal-blua ĉielo kaj sunbrilo modera "aŭdiĝis" dum la tuta ceremonio.

Laŭ-legende, mi ripetas, dum tempo primitiva, kio estas nun Santa Barbara estis tute sabla dezerto, de la maro al la montegaro, proksimume kvin mejlojn.

Deveninte de la maro, nebulo mistera intermiksis kun malordinaraj nuboj de la montegaro, kaj tute kovris la sablaĵon, dek sep semajnojn. Dum ĉi tiu tempo alternadis pluvego torenta, ventego furioza, fulmo-tondro spektakla, varmega sunbrilo helega...refoje kaj refoje....

Do! Subite, la nub-nebula kurteno ekdispartiĝis kaj ekleviĝis, kaj ...ho! Ĉiela miraklo! Kio antaŭe estis dezerto, nun fariĝis grandega ĝardeno belega, natur-viv-krevaĵo, konsistante el diversaj kolorplenaj floroj, arboj, arbetoj, arbustoj, fruktoj, montetoj, legomoj, birdoj, bestetoj... ĉiuj ĝojantaj laŭ ĉies propra esprimo de viv-vervo, en sen-manka, envivinda paradizo.

Ho! Sed baldaŭ alvenis la civilizita homo. Tamen, lia medi-malpurigo, bedaŭrinde, ne estas...laŭ legendo....

## V E R D A   A N Ĝ E L O !
de J. F. Conroy

Hieraŭ mi vidis etan birdon verdan
    kiu surteriĝis sur balkono apud la fenestro.
Kaj mi donacis al li iom da pano
    por kuraĝigi lin je vizito kun mi.
Sed respondas la birda animo
    nur al ĉiela urĝeco.
Do flugis for tiu vizitanto
    sen ekrigardo eĉ eta per malvarma okulo sia.

## D I A   K A J   A N I M A !
de Mark Mandel

Iu prahom' rigardis ĉirkaŭ si
    kaj vidis la leonon kaj la monton,
    l' arbaron kaj l' ĉielan pluvofonton,
kaj, en la nord' , la klifojn el glac' .

Li miris, kaj li timis pro nesci' ,
    vidante post la ŝtorm' la Songoponton,
    serĉante sian kreinton kaj paŝonton,
li volis Dion; kaj fariĝis Di' .

Sed nun mi aŭdis, ke, post tiu Far'
    tirinte Homon el la lago ŝlima
ni pelis Dion for, el la kredar' .

    Neniam estos jet' por mi intima
aŭ ŝtalturaro en soldata star' :
    Ĉio ne-Dia estas ne-anima.

# KRISTOFORO KOLOMBO

Naskiĝis en Ĝenova, Italujo, iam inter aŭgusto kaj oktobro de 1451, Kristoforo Kolombo. Kvankam li poste uzis ofte aliajn nomformojn, li ne estis, kiel iuj kredas, judo, portugalo, greko, ktp., sed sendube italo.

Dum sia juneco, li ne sciis legi aŭ skribi, kaj li parolis nur la italan lingvon. Por la gepatroj li laboris pri la diskombado de lano, kiun taskon li malŝategis. Aliflanke, li tre ŝatis la maron, kaj, kiam li estis 22-jara, li vojaĝis en militŝipo kiel ferdeklaboristo.

En 1476 li estis en ŝipo kiu subakviĝis apud la marbordo de Portugalujo. Li naĝis ĝis lando, kaj piediris al Lisbono, kie li renkontis sian plijunan fraton. Kune ili laboris tie, kaj pri la farado, kaj pri la kopiado de marmapoj. Sed li ankaŭ tiam havis la okazon por navigacii, kaj li do vere fariĝis kompetenta maristo.

Li edziĝis en 1479 kun filino de velŝipisto. Inter 1482 kaj 1484 li faris du vojaĝojn al la Ora Bordo de Afriko kiel ŝipestro por la reĝo.

Oni ne scias kiam, sed frue en la vivo li decidis, ke oni povas trovi direktan vojon al la oriento per vojaĝo al la okcidento. Tiu ĉi, li firme kredis, estus pli mallonga vojo ol tiu ĉirkaŭ Afriko.

Li lernis, per memstudo, la hispanan kaj latinan lingvojn, kaj legis ĉion pri kosmografio. Sed li malĝuste kalkulis la grandecon de la terglobo, kaj la larĝecon de la maro Atlantika. Li kredis, ke Japanujo sin trovas je nur 2,400 maraj mejloj okcidente de la Kanariaj Insuloj (fakte 10,600), kaj Ĉinio je nur 3,550 mejloj (fakte 11,766)! Tiamaj haveblaj ciferoj malĝustis.

Al Johano II de Portugalujo li iris en la aŭtuno de 1484 kun sia teorio kaj propono. Sed la konsilistoj de la reĝo neis la ideon, ĉefe pro la kalkuloj pri la ter- kaj margrandeco. Tutokaze, oni certe ne opiniis tiame, ke la tero estas plata - ĉiu klerulo sciis, ke la tero estas sferforma. Kristoforo do neniam necesis diskuti tiun ĉi.

Por priparoli la saman proponon, li veturis al Palos, en suda Hispanujo, en 1485, al Ferdinando kaj Isabelo. Pro la morto de sia edzino, Kristoforo kunportis la malgrandan filon, kaj metis lin en monaĥejo. La ĉefmonaĥo aranĝis por li prezenton al la reĝa familio. Dum ses jaroj li malsukcese petadis. Fine, la reĝino Isabelo ekdecidis helpi lin. Kompreneble, ili ne pensis, ke tri malgrandaj ŝipoj povas "venki" Ĉinion kaj Japanujon, ĉar ili planis nur fondi (kun permeso) komercejon.

Li estis 41-jara viro kiam li enŝipiĝis, kaj la ruĝa kapoharo jam blankiĝis. La ŝipoj forveturis de Palos. La plano estis nur navigacii suden al la Kanariaj Insuloj, kaj tie trovi la orientan venton. Ili faris ĝin, kaj velveturis sudokcidenten. La maristoj fine koleriĝis pro timo, ke oni ne povas hejmen iri kontraŭ vento. Kaj Kristoforo mem ĉagrenis, ĉar li jam plivojaĝis ol la (laŭ lia opinio) distanco al Japanujo.

La 10an de oktobro, ili konkordis veturi nur tri tagojn plu, kaj reiri se ili ne atingos landon. Sed la 12an, ili vidis insulon, kiun ili nomigis "San Salvador." Ili pensis, ke ili estas apud Hindujo, kaj, kiam ili atingis Kubon, ili kredis, ke estas Ĉinio!

Oni ne diskutu la demandon: ĉu tiu aŭ tiu alia eltrovis Amerikon. Iuj diras, ke Johano Kaboto atingis Kanadon en 1497, aliaj diras, ke Nordanoj vizitis la landon en la 11a jarcento.

Eĉ en 1970 naskiĝis nova teorio: Profesoro Gordon, de la Universitato Brandeis, diris, ke, laŭ surskribo trovita en Tennessee en 1885, kaj enmetita en la Muzeo Smithsonian, oni povas diri, ke judoj, mil jaroj antaŭ Kolombo, eltrovis ĝin. En malnova hebrea literoj, ĝi diras,"Al lando d'Judao."

Ironia afero estas la nomo de la nova mondo: Amerigo Vespuĉi donis malĝustan daton por la vojaĝo, kiun li vere faris kiel pasaĝero en 1499, kaj anstataŭ "Kolombio," la nova lando nomiĝis "Ameriko."

# OFICIALA ELNA-ADRESARO

| PREZIDANTO | VICPREZIDANTO | SEKRETARIO | KASISTINO |
|---|---|---|---|
| Francis E. Helmuth<br>5526 Beaumont Ave.<br>La Jolla, Cal.<br>92037 | Mark Starr<br>3940-47th St.<br>Long Island City<br>New York, 11104 | Conrad Fisher<br>Route 1<br>Meadville, Pa.<br>16335 | Peggy Linker<br>1414 Monroe St.<br>Walla Walla, Wash.<br>99362 |
| **UEA-ĈEFDELEGITO** | **KORESPOND-DIREKTORINO** | **INFORMCENTRO OKCIDENTA** | **INFORMCENTRO NOVJORKA** |
| Armin Doneis<br>P.O. Box 105<br>Pharr, Texas<br>78577 | Ellen A. Lewis<br>15 Salisbury Rd.<br>Brookline, Mass.<br>02146 | 410 Darrell Road<br>Hillsborough, Cal.<br>9 4 0 1 0 | 156-5th Ave.Rm. 821<br>New York, N. Y.<br>1 0 0 1 0 |

## ĜIS NUN DONANTOJ AL UK-FONDUSO

Ark., Annette Greenland (McGehee); Cal., D-ro Balcar (Monterey), Ida Belle Craig (Sacramento), Leroy Edwards (San Diego), Erik Felker (Burbank), Ella Gibson (Palo Alto), S-ino L. W. Gibson (Caruthers), S. Colum Gilfillan (Santa Monica), Hyman kaj Pauline Ledeen (Pasadena), Ralph Lewin (La Jolla), W. Campbell (Ontario), Cecelia Peterson (Downy), Minerva Rees (Hillsborough), Doris Vallon (San Mateo); Conn., Ray R. Neri (Stafford Spring); Ga., Lillian Fuller (Atlanta); Iowa, L. A. Ware (Iowa City); Ill., A. M. Brya (Urbana); Mass., Allan Boschen (Pittsfield); Md., Thomas Goodman (Baltimore); Nev., Artie Riggle (Sparks); Missouri, Espo Soc. of St. Louis; N.J., Ann Bodine (Princeton), Allan Fineberg (Paterson), Paul J. Mimlitsch (Marlton), Rene Oehler (Milford), Ed Schultz (Milburn); N.M., Roan Orloff Stone (Gallup); N.Y., Rochelle Grossman (Elmhurst), John Kailenta (Staten Island), Fred Mc Mann (Troy), Karl Nell (Rochester), Mark Starr (Long Is. City); Ohio, Jane Wills (Worthington); Ore., Jim Deer (Portland), Sunni Franceen (Oregon City), S-ro kaj S-ino Odoms (Milton-Freewater), Anne Whittaker(West Linn); Pa. R.J. Scott (Greensburg), W. P. Simpson (Harrisburg), Sidney Steinberg (Havertown); Va., Ralph Walker (Mc Lean); Wash., Al kaj Sara Ann Estling (Walla Walla), Edgar Mason (Spokane), Ken Ver Ploeg (Spokane), H. J. Weiner (Aberdeen), Ivar Ekstrand (Kelso); Wisc., Glenn Turner (Middleton); kaj Eleanor B. Martin.

(Alia listo postvenos.)

---

**ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA**
156 FIFTH AVENUE, NEW YORK, N.Y. 10010

NON-PROFIT ORG.
U. S. POSTAGE
**Paid**
Kutztown, Pa.
Permit No. 8

RETURN POSTAGE GUARANTEED
ADDRESS CORRECTION REQUESTED

[redacted]